la Raŭpo *eble* diros ion atentindan, ŝi decidis resti. Dum kelkaj minutoj ĝi silente fumadis, sed en la fino malfaldis la brakojn, elprenis la pipon el la buŝo, kaj diris :—

" Vi do kredas ke vi estas ŝanĝita ? "

" Mi timas ke jes, Sinjoro," diris Alicio. " Mi hodiaŭ ne povas memori la aferojn kiel kutime, kaj mi ne restas samalta dum eĉ dek minutoj."

— " Ne povas memori *kiajn* aferojn ? " diris la Raŭpo.

Nu, ekzemple, mi penis diri " *Rigardu ! Jen abel' klopoda* ' sed ĉio elvenis malsame," Alicio respondis per tre melankolia voĉo.

" Deklamu ' Patro Vilhelmo ' " diris la Raŭpo.

Alicio kunfaldis la manojn kaj komencis :—

Patro Vilĉ' ! Patro Vilĉ' ! (alparolas la filo)
   Blankhara vi kaj maljunulo,
Staras *vi* sur la kap' kiel korpbalancilo ?
   Ĉu ĝi taŭgas por okdekjarulo ?

" Dum junec'," Patro Vilĉo respondis al filo,
   Mi ja timis difekton al cerbo.
Da cerbo nun havas mi malpli ol grilo,
   Do tre ofte kapstaras sur herbo.

Maljunulo vi—tion denove mi diras,
   Ankaŭ grasa ĝis plena sfereco,
Tamen elrenversite la ĉambron eniras !
   Ho ! de kie al vi l'elasteco ?



Mi ja igis la korpon tre bone fleksebla,
   (Li respondis tre vigle al filo)
Per jena ŝmiraĵo—por *vi* aĉetebla
   Pobotele per unu spesmilo.

Maljunul' ! (la demandon la filo nun ŝanĝis)
   Ja sendenta al vi la makzelo,
Sed anseron kun ostoj, eĉ bek' vi formanĝis !
   Jen vere mirinda muelo !

Dum juneco min logis la leĝoscienco
   Je l'edzino mi havis procesojn :
Eĉ sur feron mi nun (dank' al tiu parenco)
   Povus fari la makzelimpresojn !

Tre maljuna vi estas ! pro tiu okazo
   Senpoviĝas, ĉu ne, la okulo ?
Tamen jen balanciĝas angil' sur la nazo !
   Ho, klarigu, mirinda lertulo !

Tri klarigojn vi havis (kolera l'ekkrio)
   Vi forkuru, vi — fosu tomatojn !
Mi ne plu da instruo . . . sufiĉas ja tio !
   Forpermeson ricevu aŭ — batojn.

— " Ne prave ! " diris la Raŭpo.

" Mi timas ke ne *tute* " diris Alicio hontante ; kelkaj el la vortoj ŝanĝiĝis."

" Malprave, de komenco ĝis fino " diris decide la Raŭpo. Sekvis kelkminuta silento.

Unue parolis la Raŭpo. " Kiun grandecon vi deziras havi ? " ĝi diris.

" Ho, pri grandeco, mi ne estas tre postulema " rapide Alicio respondis, " sed vi scias ke oni ne ŝatas tiel ofte ŝanĝiĝi."

— " Ne scias " diris la Raŭpo.